# *Distingo de la serba respubliko al Fidel Castro.*



La prezidento de Serbio, Tomislav Nikolic, distingis per la Ordeno de la Respubliko de Serbio, al la historia gvidanto de la kuba revolucio, Fidel Castro, pro ties grava kontribuo al la evoluigo de la rilatoj amikaj kaj kunlaboraj inter Serbio kaj la karibaj landoj.

Kelkajn tagojn anta?e, Nikolic kunsidis kun la prezidento Raúl Castro en Moskvo, kie amba? ?eestis la oma?ojn pro la 70-a datreveno de la soveta venko kontra? nazismo.

La serbia prezidento konfirmis sian viziton al Kubo la venontan 18-an de tiu ?i monato.

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/55777-distingo-de-la-serba-respubliko-al-fidel-castro

**Radio Habana Cuba**